Igŭacuo

Igŭacuo, aŭ Iguasuo, (portugale: Foz do Iguaçu; hispane, Iguazú), estas granda akvofalo inter Argentino kaj Brazilo, ĉe la landlimo al Paragvajo. Ĝi altas 72 metrojn kaj havas 150-300 falojn, depende de kiom rapide la rivero Iguacuo moviĝas.

Ĝi estas Monda Naturheredaĵo de Unesko.

La akvofaloj estas apud elektrocentralo Itajpuo.

Trafluinte de Curitiba (Brazilo) pli ol 1.300 kilometrojn da brazila lando, la rivero Iguazú, 15 kilometrojn antaŭ enflui la riveron Paraná, akiras mondan famon pro sia imponega katarakto. Tiu malsuprenĵetiĝas ĉe la 25a grado de suda latitudo. Do abundas tropika vegetaĵaro, kiu nun troviĝas sub ŝtata naturprotektado kaj ĉirkaŭas la belegan vidindejon malkovritan en 1541-42 de la hispano Alvar Núnez Cabeza de Vaca ("Bovin-kapulo").

275 akvofaloj, kelkaj el ili falantaj preskaŭ 90 metrojn, estas admirataj tie de miloj da turistoj, kiuj daŭre alveturas. La akvofalara duoncirklo etendiĝas tra 2.700 metroj, krucante la limon inter Argentino kaj Brazilo. Do la multnombraj videmuloj devas trairi la limkontrolon por ĝui la tuton de la grandioza spektaklo. La rivero Iguazú ĵetas normale 1.700 m^3 da akvo sekunde tra siaj kaskadegoj, kies roka arkitekturo fariĝis antaŭ 50 milionoj da jaroj.

Sed laŭ la meteorologiaj kondiĉoj, tiu flukvanto ege malsamas. Laŭdire en la jaro 1978 la fluejo preskaŭ sekiĝis kaj la fama katarakto seniluziigis la vizitantojn. Male antaŭ kelke da tempo pro fortegaj pluvoj la rivero multobliĝis tiom, ke ĝia akvokvanto superis 30.000 m^3 sekunde. La akvonivelo suprenirinte kelkajn metrojn detruis parton de la pontvojoj, kiuj en la argentina flanko kondukas la turistojn ĝis la Garganta del Diablo ("Gorĝo de l' Diablo").

Tie akvofalegoj, unu vide al la alia, malsuprenĵetiĝas en tondranta truego. Per motorboatoj la videmuloj nun trairas la mankantajn partojn de la pontovojo por admiri ekde sekura platformo la sovaĝan spektaklon de la bruegantaj akvoj.

Personoj kiuj estis vidintaj la katarakton de Niagara (Usono), asertas, ke tiu de Iguazú estas pli impona. Oni surpriziĝas vidi inter la homoj strangan mambeston petantan nutraĵojn. Tiuj coatí alvenas propravole de la arbaro por profiti siamaniere de la turista konjunkturo, kiel la flugkompanioj, la busoj, la hoteloj, komercistoj kaj tiel plu.

Retpaĝo: www.traduki.de
Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Igŭacuo